


3

1980

MONATA REVUO
FONDITA
EN JARO 1903

OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIĜO
ESPERANTISTA



ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO
ESPERANTISTA*Honora Prezidanto:*

Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B-3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:

Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I-47037 Rimini/Forlì, Italio

Vicprezidantoj:

Sac. Roger Degrelle, 11 cours Léopold, F-54042
Nancy Cedex, Francio;
Sac. Józef Gotter, Trzebnice 113, PL-59.312
Chocianowice, Pollando

Sekretario:

Antonio De Salvo

Kasisto:

Sac. Felice Ruaro, I-37010 Costermano (Verona),
Italio

Estraro:

A. Beckers, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki,
J. Gotter, H.J. Kindler, J. Kondor, J. Korytkowski,
F. Ruaro, J. Zielonka

Plenumkomitato:

Aŭstrio: W. Mudrak; *Belgio:* E. Paesmans; *Ĉeĥo-
slovakio:* J. Pastrnakova, M. Sváček; *Francio:* L.
Bourdon; *F.R. Germanio:* B. Eichkorn; *Hispanio:*
M. Casanoves; *Hungario:* E. Stancz; *Italio:* A. Cic-
canti, S. Giacchino, G. Pisoni; *Nederlando:* S.P.
Smits; *Pollando:* J. Korytkowska, J. Kos, B. Sobol;
Svislando: F. Bommer; *Usono:* A. Herschel

Centra Oficejo:

Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:

Espero Katolika

Kotizo por 1979:

20 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la Tribunalo de Romo

(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):

Antonio De Salvo
C.P. 4017, I-00100 Roma Appio (Italio)
tel. (06) 780782 (vespere)

Presejo (Tipografia):

ROTATORI
Viale Manzoni, 22/b - Roma

Sur la kovrilo: Papo Johano Paŭlo dua (foto Ansa).
Ĉu li, plenumante la peton de la Esperantistoj, sa-
lutos je Pasko ankaŭ en la internacia lingvo?

ENHAVO

- 27 Al la Papo (*D. Magnani*)
28 Vigla animzorgado en Pollando (*F. Bardecka*)
29 Ni funebras kaj kondolencas
30 Novjara renkonto (*M. Sosińska*)
31 Lumilo de Sanktejo (*A. Beckers*)
31 Ni dankas
32 Iom pri la kredo de la iamaj Maorioj (*J. Hamvai*)
36 Novaj landaj reprezentantoj
36 Plibonigu la mondon, komencu de vi mem!
37 Ni gratulas
37 Papaj preĝintencoj por marto
37 Papaj preĝintencoj por aprilo
38 Pri liturgio (*A.D.S.*)
39 Legantoj skribas (*J.Hamvai, Rondo «Kunlaboro» en Rawicz/Pollando, L. Franzoni, A. Németh, G. Pausback*)
42 Esperanto en Tajvano (*J.B. Kao*)
43 Katolika horizonto
44 Landaj reprezentantoj de IKUE

La bildoj de ĉi tiu numero estis aĵable liveritaj de la itala Registaro (Presidenza del Consiglio dei Ministri), de la novzelanda Ambasadorejo en Romo, kaj de la E-Rondo «Kunlaboro» en Rawicz/Pollando.

Periodico culturale - gruppo III - pubbl. inf. 70% - lire 600.

Kultura periodaĵo - monata - malpli ol 70% da reklamo - 600 liroj.

AL LA PAPO

P. Magnani havigis al la Papo, 12.3.1980, ĉi tiun leteron, en itala lingvo:

« Beatega Patro,

malgraŭ la neokazinta kristnaska saluto en Esperanto kaj la silento sekvinta al mia letero de 25.12.1979, mi tamen restas, kun fila konfido, ĉe pordo de la Patro.

Via Sankteco bone scias, ke, malantaŭ mia malgrava persono de Prezidanto de la Katolikaj Esperantistoj, ĉeestas Episkopoj, Sacerdotoj, Religuloj kaj Religiulinoj, laikoj (laboristoj, profesiuloj aŭ universitataj profesoroj, ktp), kiuj afable insistas, por ke la Plejsupra Pontifiko, okaze de S. Pasko, salutu la tutan esperantistan mondon en ilia internacia lingvo esperanto. Ankaŭ la milionoj da nekatolikaj Esperantistoj, kiaj islamanoj, hebreoj, budhanoj, kaj precipe la protestantaj aŭ anglikanaj aŭ ortodoksaj fratoj, fidele atendas, ke la Papo anoncu ankaŭ al ili la Paskon en tiu lingvo, kiu jam de multaj estas difinata « ekumena lingvo ».

Kvankam la Katolikaj Esperantistoj estas certaj, ke la esprimoj, skribaj kaj voĉaj, manifestitaj de Via Sankteco okaze de la 37-a Kongreso de IKUE en Ĉenstoĥovo en 1977, daŭre estas vivaj en Via animo, tamen ili ne kaŝas al si la rezistojn, kiujn Via Sankteco nun devos superi por akcepti ilian peton. Malgraŭ tio, la Esperantistoj estas konvinkitaj, ke la « Papo de l'Homino », heroldo de ĉiu rajto de la persono kaj de la komunajo de la popoloj, valorigos ankaŭ ĉi tiun solvon, Esperanton, de la problemo de la interkomunikado de la popoloj.

Pro tio, Beatega Patro, mi permesas al mi aldoni al ĉi tiu letero kelkajn frazojn de paska bondeziro en lingvo Esperanto, kun la koncerna elparolo kaj itala traduko. Tamen, Patro Giacinto Jacobitti, prizorganto de la Esperanto-fako de Vatikana Radio, estas ĉiam tre ĝoja esti je Via dispono.

En la ĝoja espero, ke mi povos file omaĝi al Via Sankteco, persone, okaze de la speciala Papa Aŭdienco por la fideluloj de la Diocezoj de Rimini kaj Cesena, la 19-an de venonta aprilo, mi fidoplene petas, por mi kaj por la tuta katolika esperantista familio, Vian Apostolan Benon.

Devotega kaj respektoplena filo

Sac. Duilio Magnani
Prezidanto de IKUE

En la listo de la polaj katolikaj Esperanto-aranĝoj, aperinta en EK 1-2/80, pro bedaŭrinda preseraro forfalis grava ero, nome la Esperanto-diservo kiu okazas, ĉiun duan dimanĉon je la 15-a koro, en Krakovo, Wiosny Ludów 5, PP Franciskanoj, kun posta kultura renkontiĝo en la tiea katekezo.

Oni bonvolu pardoni la pres-eraron.

VIGLA ANIMZORGADO EN POLLANDO

Nome de la polaj katolikaj esperantistoj, mi volas raporti pri kelkaj okazintaĵoj en Pollando. Eble tio estos interesa ankaŭ por aliaj IKUE-anoj.

I - La 30-an de septembro 1979 ni havis en Ĉenstoĥovo preĝtagon por la esperantistoj el tuta Pollando. Alvenis ankaŭ delegitoj el Ĉeĥoslovakio kaj Hungario. Kune ĉeestis 153 personoj, inter kiuj 7 pastroj kaj 4 fratulinoj. Ĉar la preĝtago estis malfermita, partoprenis, aldone, en niaj diservoj, amaso da aliaj pilgrimantoj. Tio signifas, ke nia esperantista preĝtago estis pli multnombra ol la 38-a IKUE-Kongreso en Luksemburgo (laŭ la Kongreslibro). Ankaŭ la tuta enhavo de la preĝtago kaŭzas nian fieron.

La Hela Monto estas la centro de la pola katolikismo, kvazaŭ Pola Vatikano, speciale prizorgata de episkoparo, do oficiala kunveno de esperantistoj en tiu loko estas jam granda evento en nia movado. Estroj de la Hela Monto akceptis nin tre afable, kaj nian preĝtagon anoncadis per la lokaj komunikiloj, kaj, sabate kaj dimance, dum ĉiuj diservoj. Tuj rimarkis tion eksterlandaj ĵurnalistoj kaj eĉ Radio Vatikana, en la pola disaŭdigo, ĝoje parolis pri la evento.

La preĝtago okazadas ĉiujare en la lasta dimanĉo de septembro. La esperantistoj tiamaniere engaĝiĝas en la vivantan Eklezion, en kiu ili volas esti aktivaj membroj.

Temon por la meditoj donis al ili: la 1-a datreveno de la papa elekto, la 40-a datreveno de la dua mondmilito kaj la 50-a datreveno de la katolika esperantomovado en Pollando.

Ekde la 5-a horo esperantistoj partoprenis en la polaj diservoj, kun ĉiuj aliaj pilgrimantoj, en la kapelo de la Gracodona Bildo, la « Nigra Madono ». La esperantista kunveno komenciĝis aparte, je la 7-a horo, en la « Papa Salonego », la plej bela sur la Hela Monto. En la kadro de la preĝtago okazis:

1) Malfermo de la preĝtago kaj salutoj, inter kiuj estis letero de Papo Johano Paŭlo dua kaj letero de Episkopo Władysław Miziołek el Varsovio.

2) Himno de IKUE, kiun kantis ĉiuj.

3) Preĝoj intence de la Papo kaj la Eklezio, intence de la forpasintaj naciherooj, mortintaj esperantistoj kaj, fine, intence de ĉiuj individuaj kaj aktualaj problemoj, kiuj tuŝas la esperantistaron. La preĝado estis dividita inter la partoprenantoj.

4) Raporto pri la tutpollanda laboro de la « Animzorgado de Esperantistoj », kiun prezentis p. J. Zielonka, la ĉefanimzorganto. Poste, pri la 38-a IKUE-Kongreso raportis p. J. Kos. Sekvis raportoj el diversaj lokoj de Pollando kaj diskutoj pri ties enhavo kaj la venonta agado.

5) La unuan parton de la programo ornamis kortuŝa elpaŝo de la ĉenstoĥova junularo sub gvido de s-ino W. Stiens. La koruso prezentis al ni multajn recitaĵojn kaj kantojn.

6) Post ioma paŭzo ĉiuj preparis sin al la komuna celebrado de la E-diservo. La meson kuncelebris 7 pastroj.

7) Post la meso kaj prediko, kiun havis la ĉefa animzorganto, ĉiuj preĝis la Anĝeluson en unueco kun Papo Johano Paŭlo dua.

8) La antaŭtagmezan parton de la preĝtago kronis artisma kantado de la varsovia koruso « Lutnia », kiun estris s-ro Tomaszewski.

9) Post la tagmezo komenciĝis la tria parto de la preĝtago per sankta Krucvojo sur la helmontaj remparegoj. Ĉe ĉiu stacio preĝis aliaj pastroj kaj laikoj nome de propra animzorga grupo.

10) Por fini la debatojn, kaj diskutojn, kaj subskribi decidojn kaj planojn, la esperantistoj denove kunvenis en la Papa Salonego. Tie ankaŭ okazis fermo de la preĝtago.

11) Kiel la lasta akcento de la preĝtago, sekvis debatoj de la pola E-aktivularo.

II - Kiel reeĥo de la preĝtago okazis en Krakovo la loka kunveno. Kiel kutime, en ĉiu dua dimanĉo de la monato, oni celebris s. Meson en Esperanto la 14-an de oktobro en la preĝejo de PP Franciskanoj, kiun gvidis p. M. Krzymowski. Post la E-diservo la esperantistaro kunvenis en la apuda salono por diskuti pri la lastaj eventoj en la Eklezio, speciale pri la papaj vojaĝoj kaj instruoj. La meditojn ilustris per diapozitivoj s-ino H. Brede el Kielce.

III - Ĉar ni ne estas sanktuloj kaj ofte diversaj pekoj malpurigas al ni la ĝustan vojon al la ĉielo, la esperantistaro el suda Pollando decidis arangi pentofaran pilgrimon al Kalvario de Zebrzydowice. La 21-an de oktobro, frumatene, kolektiĝis tie esperantistaro. Post la komuna s. Meso kaj partopreno en sakramentoj, ni foriris vizitadi pli ol kvardek kapelojn disjetitajn sur la apuda montaro en distanco de sep kilometroj, ĉiam preĝante, kantante kaj meditante. Kompreneble, ĉio okazis en la internacia lingvo, kio vekadis grandan intereson ĉe la aliaj pilgrimantoj. La pilgrimon gvidis p. J. Zielonka.

Jam nokte ni revenis hejmen, lacegaj en la korpo sed ĝojaj kaj optimisme rigardantaj la vivon. Kiel eĥo sonis en niaj oreloj. « Kiu por ni portis vundojn, Jesu-Kristo, estu kompatema! ».

Franciska Bardecka, Krakovo, Pollando

● La svisa KELI-sekcio organizas (19-20.4.1980) ekumenan semajnfinojn en Filzbach (Svislando). Aliĝojn akceptas s-ino Ruth van Puijenbroek, Alte Römerstr. 9, CH-8404 Winterthur, Svislando.

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

† La edzino de nia ĝisnuna landa reprezentanto por *Usono*, Herb Corlett. Ni memoru ŝin en niaj preĝoj.

Al la funebranta familio, multajn kondolencojn.

NOVJARA RENKONTO

Kiel ĉiun jaron, 13.1.1980 okazis renkonto de la varsoviaj esperantistoj kun Episkopo Władysław Miziołek.

Komence, en la preĝejo S. Aleksandro en Varsovio, okazis la S. Meso, kiun kuncelebris la Episkopo kun la Pastroj J. Zielonka kaj R. Forycki, kaj alumno el Varsovia Pastra Seminario T. Bazylewicz.

Predikis p. J. Zielonka, kiu substrekis, interalie, la grandan valoron de Esperanto en la servo de la Eklezio. La internacia lingvo povas kunigi per liturgio multajn homojn, de diversaj nacioj, en la amikeco, frateco, boneco.

Dum la S. Meso, en kiu partoprenis ankaŭ neesperantistoj, kantis sinjoro E. Pawlak, kantisto de Varsovia Operejo, kaj la koruso « Muzilo ».

En la plenplena preĝejo oni povis aŭskulti la sonon de kantoj kaj la flustroj de esperantaj preĝoj.

Post la S. Meso, en la paroka domo okazis vespera renkonto.

Lia Ekscelenco, kore bonvenigita, bondeziris al la katolikaj esperantistoj feliĉon en novjaro, sanon kaj sukcesojn en la vivo.

La Episkopo substrekis la grandan senlacan laboron de p. J. Zielonka, la penon de R. Forycki. Li menciis ankaŭ fraton K. Kaczmarek, kiu organizas esperantajn solenaĵojn en Niepokalanów, kie iam agis beata Maksimiliano Kolbe. Montrante la junan alumnon T. Bazylewicz, li esprimis la esperon, ke venonte li estos aktivulo de la katolika Esperanto-movado.

Poste, p. J. Zielonka prezentis la riĉan kaj vastan programon de la animzorga tutlanda jarlaboro.

B. Monkiewicz informis pri la libro de Episkopo Władysław Miziołek « Enkonduko al Ekumenaj Problemoj », kiun eldonis la IKUE-Centro en 1978 en lia esperanta traduko.

M. Sosińska sciigis, pri la planata unua esperanta murgazeto, kiu estos ekspoziciita en la vestiblo de la preĝejo Sankta Aleksandro en Varsovio.

Ĉiuj ĉeestantoj, instigite de la kara Episkopo, ĉe glaso de teo kaj kuko, ĝoje, en agrabla etoso, interparolis kaj kantis.

Marta Sosińska, Varsovio, Pollando

● 30.12.79 okazis en Bielsko-Biala (Pollando), en la Kapelo de B. Jan Sarhander, S. Meso tute en Esperanto, celebrita de P. Jozefo Zielonka. La diservon partoprenis ĉirkaŭ 60 Esperantistoj el Bielsko Biala kaj aliaj urboj, ankaŭ malproksimaj, kune kun du eksterlandaj gastoj. Ĉeestis, krome, multaj neesperantistoj, ĉar la Meso estis anoncita de la parokestro, kiu ankaŭ invitis la parokanojn. Post la Meso, okazis amika renkontiĝo en la paroka domo.

En Bielsko Biala Esperanto-diservoj havas lokon ĉiun kvinan dimanĉon de la monato, do 3 ĝis 4 foje en la jaro.

Stanisław Pochanke, Pollando

LUMILO DE SANKTEJO

Kiu konas (aŭ, pli bone, konis) tiun revuon?

Tamen ĝi ekzistis, sed, bedaŭrinde, nur dum iom pli ol kvar jaroj.

Jen la mallonga historio.

Inter la jaroj 1930 kaj 1935, ekzistis en la pastra Seminario de Lieĝo (Belgio) grupo de esperantistoj.

La grupo decidis fondi malgrandan revuon inter proksimume 9 eŭropaj Seminarioj. Post longa preparado kaj korespondado, la revuo komenciĝis.

La eldonejo estis en la Lieĝa Seminario. Pro la malgranda eldonkvanto, ĝi estis stencilita. La revuo estis forsendata de Lieĝo al Francio, Germanio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Aŭstrio, Hungario kaj Italio. La revuo cirkuladis dum proksimume kvar monatoj, revenis al Lieĝo, kaj la sekvanta numero komencis la rondiron ktp.

En la revuo oni parolis pri la seminaria vivo kaj pri teologiaj problemoj.

Post 1935 pluraj, en la diversaj grupoj, pastrigis, kaj la revuo bedaŭrinde malaperis el la Seminarioj de diversaj landoj, kvankam esperantistoj daŭre ekzistis ankoraŭ en pluraj Seminarioj (ekz. en Pollando kaj Ĉeĥoslovakio: mi spertis tion kelkajn jarojn post la milito, kiam mi renkontis ilin en Varsovio kaj en Prago). La lastan mi renkontis en Finnlando: tiu kunfrato ankoraŭ parolis Esperanton, sed dum multaj paroj li ne praktikis ĝin. Bedaŭrinde!

Ĉu en la diversaj eŭropaj Seminarioj tio ankoraŭ estas ebla?

Ĉu la tiamaj kunfratoj ankoraŭ vivas?

A. Beckers, Rozenlaan 5, B-3950 Beringen (Belgio)

NI DANKAS

Donacis monon al IKUE:

Aŭstrio: Primetzhofer; *Belgio:* Muller, Peeters, Verstraeten; *Francio:* Besière, Thiollière; *F.R. Germanio:* Blick, Greifenegger, Klene, Meyer, Moser, Peters, Post, Sack, Wirges; *Hispanio:* Arnaiz; *Hungario:* Kollár; *Italio:* Angeletti, Corrias, De Salvo, Gamberini Billi, Leoni V., Magnani, Marcetta, Pellis, Ruaro, Serratrice, Stocchiero, Valvassori Peroni; *Nederlando:* Fischer, Van Well; *Svislando:* Bommer; *Usono:* Sienkiewicz.

Donacis Esperantaĵojn al IKUE:

Aŭstrio: Mudrak; *Belgio:* Paesmans; *Ĉeĥoslovakio:* Poledník, Berka; *F.R. Germanio:* Kondor; *Italio:* De Salvo, Jacobitti, Rizzo; *Jugoslavio:* Krĉmar; *Tajvano:* Kao.

Al ĉiuj donacintoj, multajn dankojn.

IOM PRI LA KREDO DE LA IAMAJ MAORIOJ

(J. Hamvai, *Auckland, Novzelando*)

La religio de la maorioj ne estis difinita, sistema kolektaĵo de dogmaj kaj ritaj reguloj. Ĝi estis malfiksa kolektaĵo de diversaj kredo-imagoj kaj ceremonioj, kiuj donis vastajn eblojn al la individuo por praktiki ilin.

Idolojn ili ne havis, sed la maorio multe pensadis, meditis pri sia deveno kaj pri la origino de la mondo, de la homo... entute pri la estiĝo de la vivo... kaj ne povante diveni kaj solvi la grandegajn misterojn, li kreis al si solvon pere de mirinde belaj fabeloj-legendoj de sia fantazio.

La radikoj, — origino de la kredo de la maorioj — estis naturadorado, kun la estimo de la prauloj.

Rangi estis la *Ĉielo*, la vira naskanto de ĉiuj ekzistaĵoj, *Papa* estis la *Tero*, la akceptantino kaj patrino de ĉiuj kreitaĵoj. La ventegoj kaj ŝtormoj havis siajn proprajn diojn, same ankaŭ la oceano. Lia nomo estis *Tangaroa* kaj li regis super kaj sub la oceanoj. Tie ĉio kaj ĉiu estis lia subulo. Memkompreneble, en la Pacifiko li estis unu el la plej respektataj dioj, sed ankaŭ ĉiu monto, arbo, naturfenomeno havis sian dion. Nur la maoriaj pastroj, kiuj posedis la « sekretajn konojn », sciis, ke super ĉiuj ĉi dioj ekzistas unu plej alta estaĵo, kiu finfine estas la « UNUA KAŬZO » de ĉio: ... « IO »... estis lia nomo, ofte ili nomis lin ankaŭ « LA KAŜITA VIZAĜO », sed la simpla, amasmaorio ne rajtis scii pri tio.


Ĉe la honorigo de IO nur la plej altrangaj pastroj kaj tribestroj rajtis partopreni. La plebo ne rajtis koni ankaŭ la 12 diversajn nomojn de IO.

La maorio ne preĝis. Anstataŭ preĝado je diversaj okazoj li ĉantis diversajn petojn, alvokojn en la formo de recit-horaj kantadoj. Tiajn kantaĵojn li aplikis je okazoj de naskiĝo, geedziĝo, divorco, morto, funebraj ceremonioj. Sed similaj ensorĉoj helpis ankaŭ atingi bonajn rezultojn en la diversaj ludoj. Ĉi tiuj estis ĉiam ritmaj, ilia nomo: *Karakia*. Tiam diraĵon unu komencis kaj ripetis ĝin ĝis li senspiriĝis, tiam alia partoprenanto daŭrigis same. La fuŝigo kaj haltigo de karakia povis kaŭzi grandan katastrofon al la persono.

La maorio kredis, ke la homo konsistas el tri partoj: el *Tinana* = korp, el *Mauri* = animo kaj el *Wairua* = spirito.

En religiaj kaj mondaj demandoj kaj problemoj la plej gravaj konsilantoj estis la pastroj, kiuj apartenis al la plej altrangaj kaj respektataj gvidantoj de la triboj. La pastro, *tobunga*, devis origini el nobela familio, sed oni elektis nur la plej kapablajn knabojn por tiu ofico.

Kiel ni jam menciis la principo de la maoria teozofio estis, ke la homo konsistas el tri partoj. La « *mauri* » estas la « viv-fajrero », kiu enestas en ĉiu vivantaĵo: homo, vegetaĵoj, objektoj, kaj ĝi estas ilia kreskiganta, disvolvanta, kuntenanta forto. Se la *mauri* forlasas la homon, li mortas, kiam la floron, vegetaĵon, tiam ili velkas, kiam domon, ŝtonon, lignon, tiam ili putriĝas, disfalas. Simple: la *mauri* estas la vivoforto aperanta en multaj formoj.



Novzelanda preĝejo laŭ maoria stilo

Post la morto la *wairua* havas ankoraŭ multajn « terajn kvalitojn » kaj ĝi bezonas ankoraŭ longan tempon ĝis ĝi transformiĝas etera. Kaj pro tio estas, ke la *wairua* (spirito) de la mortinto ankoraŭ dum longa tempo post lia morto ne foriras en la « spiritmondon », sed kaŝvagadas ĉirkaŭ sia hejmvilaĝo.

La spiritoj de la mortintoj vivas en la subtera spiritmondo similkorpforme kaj inter cirkonstancoj, kiel surtere ili vivis: ili loĝas en domoj, manĝas, laboras ktp.

Kiam iu ekmortas, liaj prauloj venas kaj kondukas lin en la spiritmondon.

La maorio ne konis la « punon pro pekoj » post la morto. (Pri surtera justeco kaj puno ni eble parolos iun alian fojon).

Li nenian konstruaĵon faris por specialaj religiaj celoj, sed ĉiam kaj inter ĉiuj cirkonstancoj li rememoris pri la koncerna dio.

La unua rikolto, frukto, fiŝo, mortigita sovaĝbesto ĉiam apartenis al la loka dio. La nomo de la solena ofero estis « *whakabere* » = « repaciga donaco ». Sed kiu estis survoje ien, simple povis flanken ĵeti ĝin, kun la rimarko: « Via manĝaĵo, ho Whiro! ».

Malofte ili prezentis ankaŭ homan oferon, kies celo estis repacigo de la dio, sed nur okaze de milito kontraŭ alia tribo. Tiam la ofero estis aŭ sklavo aŭ por tiu celo oni atakis alian tribon. En militado la korpo de la unua mortigita malamiko estis « *tapu* » kaj ties koron ili oferis al la milit-dio.

Aliaj kaŭzoj por hom-ofero estis: konstruo de grava domo (renkontiĝ-domo, « kulturdomo »), la surakvigo de milit-kanuo, finpreparo de nova « pa » (vilaĝo), peto por bona rikolto.

Jam menciite, ke la nomo de la pastro-tribestroj estis *tobunga*. Sed ankaŭ ili apartenis al diversaj, pli altaj gradoj. La plej respektataj estis la *tobunga ahure* aŭ la *tobunga tuahau*. La tohunga ahure kaj tuahau estis la pastroj de IO kaj nur tiuj ricevis ezoterikan instruadon. Preskaŭ ĉiam ili devenis el tribestraj familioj, ili estis la sciantoj kaj konantoj de la historio de la tribo, krome indik-gardantoj, astrologoj, kuracistoj, militgvidantoj, agrikulturaj ekspertoj.

Tiujn ĉi konojn ili ricevis dum longjaraj instruadoj en la *Whare Wananga* (lernejo), kiuj estis trigadaj.

La maorio havis nenian formon de skribo kaj pro tio lia memorkapablo estis eminente evoluigita. Apartiĝinte da ĉiu alia pli supera civilizo la maorio devis sin konfidi entute al sia memoro, al buŝa tradicio, al pervorta instruado, por ke li povu gardi al si sian altetaksitan folkloron kaj tiel pluenigi ĝin al siaj idoj. Kaj por tiu celo oni edukis la plej bonkapajn kaj nobelajn infanojn en la *whare wananga*, per sistema, regula instruado dum jaroj.

Nia nuna celo estas iom paroli nur pri la religiaj konceptoj de la maorio kaj por fino ni prezentas la imagon pri la

KREADO DE LA MONDO.

(Ni volas tiri la atenton de nia kara leganto al la fakto, ke ĉi tiun — kaj la sennombrajn aliajn — mitologiajn fabelojn divenis la maorio, kiu vivis ankoraŭ antaŭ la alveno de la kristanismo pere de misiuloj).

— Komence estis la mallumo kaj en tiu ekzistis la unuaj prapatroj de ĉiuj ekzistaĵoj: *Rangi* la Ĉiela Patro — kaj *Papa* — la Tera Patrino. Sed ili estis tute kune, ĉirkaŭbrakante unu la alian en granda amo. Ili ekhavis sian unuan idon, *Tane*, kiu poste kreis ĉiujn aliajn idojn.

Tane ne ŝatis vivi en la mallumo kaj li perforte apartigis siajn gepatrojn, por ke estu lumo. Ili havis jam ankaŭ aliajn idojn kiam, ĉefe je la iniciato de *Tane*, malgraŭ la kontraŭstaro de la gepatroj la idoj disigis ilin. Ili supren-premis *Rangi* — la Ĉielon kaj malsupre restis *Papa* — la *Terpatrino*. Sed ili ambaŭ sopiras unu je la alia kaj ploras ofte. La ploroj de *Rangi* estas la pluvoj kaj de *Papa* estas la nebulo.

Kvankam la infanoj estis malbonaj kontraŭ siaj gepatroj kaj pro tio ili devis morti, *Rangi* kaj *Papa* diskutis, kiu ekhavu ilin post ilia morto? Fine *Papa* — la Patrino — konvinkis la patron: Mi naskis ilin, do lasu, ke ankaŭ post ilia morto ili restu kun mi. *Rangi* konsentis.

La unuaj idoj estis la plej gravaj dioj, kiuj konformis al ĉiuj gravaj naturaj fenomenoj. La unua kaj plej grava inter ili estis *Tane*, kies plej grava aperformo estas la suno, li estis la dio de fekundeco, kiu kreis ĉiujn arbojn kaj vegetaĵojn, kreskaĵojn kaj li kreis la unuan homon, kiu estis virino — la *Terknabino* —. *Rongo* estas la dio de luno, la kreanto de paco, artoj kaj agrikulturo. *Tu* estas la dio de la morto kaj milito. Sed la plej malbona

inter ĉiuj estas *Whiro*, la dio de la mallumo kaj la reganto de la mortintoj.

Kiam *Rangi* kaj *Papa* estis disigitaj, fariĝis la ĝenerala lumo, sed la idoj volis poste pli grandan lumon. Kaj pro tio tiuj idoj, kiuj estis kun *Rangi*, kreis la stelojn, lunon, sunon.

Sed super ĉiuj ĉi tiuj, en la plej granda, nekomprenebla alto vivas la PLEJ SUPRA ESTAĴO, *IO*, kiu finfine estas la origino de ĉio... Li loĝas en la dekdua ĉielo, kien nur *Tane*, la ĉefdio sur la tero, povis foje supreniri kaj tie li ricevis tri korbojn da diferencaj scioj. Tiuj konoj kaj scioj estis parte bonaj kaj utilaj, parte malbonaj, malutilaj. Ĉiuj ĉi tiuj estis la « sekretaĵoj », magiaj, okulta konoj. Kiu homo konas parton de tiuj, tiu havas *M A N A* = (Potenco, respekto).

Ĉiuj unuaj dioj, idoj de *Rangi* kaj *Papa* estis virseksaj. Pro tio la maorio sentis, ke li devas serĉi ankaŭ la originon de la virina sekso, precipe ĉe la kreo de la homaro. Kaj li fine solvis tion en alia, belege-ĉarma legendo: *La kreo de la virino*.

Ni ĉi-foje intencis prezenti iom el la maoriaj praaj religiaj imagoj, precipe pri la supertera, spirita mondo kaj por la finkonkludo ni volas altiri la atenton de la leganto, kiom multe da plej noblaj ideoj de jud-kristanismo enhavas la maoria pensado kaj kredo. Tion rimarkante nomas la profundaj studentoj la maorian « kredon » transiro de la pagana kredo adoranta multajn diojn al kredanteco en UNU DIO!

Kaj ĉiujn ĉi kreis al si la maorio antaŭ multaj jarcentoj — en tuta izoleco kaj soleco!

● Francaj katolikaj esperantistoj kongresos en Sens de 31.5 ĝis 2.6.1980. Informoj ĉe s-ino J. Vincent, 26 bis rue de Milngavie, F-49150 Baugé, Francio.

● La 12-a Trilanda Konferenco (de Esperantistoj el Aŭstrio, Jugoslavio kaj Italio) okazos en Udine (Nord-orienta Italio) de la 23-a ĝis la 25-a de majo 1980. Estas antaŭvidita ekumena diservo en Esperanto dimanĉon la 25-an. Aliĝojn akceptas: Istituto Tecnico per il Turismo « A. Volta », Via Q. Sella 1, I-33100 Udine, Italio.

● Italaj katolikaj esperantistoj kunvenos en Asizo de la 24-a ĝis la 27-a de aprilo 1980, precipe kun la celo pridiskuti kelkajn organizajn problemojn. Esperantlingva Meso okazos 25.4.1980. En la programo estas antaŭviditaj, interalie, interŝanĝado kaj aŭkcio de esperantaĵoj. Informoj ĉe UECI, viale C. Zavagli 73, I-47037 Rimini/Forlì, Italio.

NOVAJ LANDAJ REPRESENTANTOJ

Kiel antaŭanoncite jam kelkajn monatojn pli frue, s-ro H. S. Corlett, de pluraj jaroj landa reprezentanto por Usono, devis forlasi sian postenon pro nebona farto, relative alta aĝo kaj familiaj zorgoj (lia edzino ĵus mortis, post longa malsano).

Dum IKUE sincere kaj tutkore dankas al s-ro Corlett pro lia merita, multjara agado, estu bonvenigata la nova Landa Reprezentanto por Usono, s-ro Mark B. Weddell, kiu tiel prezentas sin:

« Mi estas 23-jara komercisto/studento en belega regiono de Florido, ŝtato de Usono. Mi estas denaska katoliko kaj nur dujara Esperantisto, sed mi intencas labori per kaj por Esperanto dum mia tuta vivo. Mi havas la honoron esti la Ĝenerala Sekretario de la Esperanto - Societo de Florido, kaj redaktoro/eldonanto de ties ĉiumonata novaĵletero, La Sunbrila Gazeto. Mi estas ankaŭ la kasisto de Amerika Katolika Esperanto - Societo, membro de la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, membro de UEA kaj kandidato al ties faka delegiteco pri komercaj, katolikaj kaj junularaj aferoj. Koncerne mian neesperantistan vivon, mi baldaŭ havos diplomon pri Lingvoj kaj Lingvistiko, kaj nun studas la komputilan fakon ĉe la loka Universitato ».

Nova Landa Reprezentanto de IKUE ankaŭ en Madagaskaro: s-ro Roger Randrianekena (kies Esperanto-agadon ni jam menciis en la paĝoj de EK) anstataŭas s-ron Eugène Raveloson.

Fine, en Kolombio s-ro Jorge G. Velásquez anstataŭas s-ron E. Palacios Toral.

S-ro Velásquez estas, verŝajne, la ĉefa aganto de la (ankoraŭ malforta, sed esperiga) Esperanto-movado en Kolombio.

PLIBONIGU LA MONDON, KOMENCU DE VI MEM !

Tiu ĉi slogano, bele kaj grandlitere presita sur kartono, dissendiĝis en 10.000 ekzempleroj je la fino de februaro 1980. Vi povas pingli ĝin aŭ enkadrigi ĝin en via vivĉambro, deĵorejo, akceptejo... ie ajn.

Ĉiun trian monaton aperos nova slogano.

Tiaj kartoj ekzistas jam de multaj jaroj en la nederlanda, franca, hispana kaj ĉina lingvoj. Temas pri iniciato de la vaste konata « *Movado sen Nomo* ». Ĝi estas bonfara organizaĵo, kiu okupiĝas pri la morala kaj materia subteno de helpobezonaj homoj.

Dum la Zamenhof-tago en 1978 la *Movado sen Nomo* jam startis kun Esperantlingva telefonservo en Antverpeno, Belgio (Vitaminoj por la Koro, v. EK 2/79). Ĉar la sukceso estas tiel granda (kutime po kvino da telefonalkvokoj ĉiutage, ankaŭ el eksterlando, sed kun pintoj ĝis pli ol cent alvokoj en UNU tago) ĝi nun uzos Esperanton por diskonigi siajn sloganojn. Se vi volas ricevi ilin, kvarfoje en la jaro, vi tutsimple konigu vian nomon kaj adreson al: MOVADO SEN NOMO, Korte Altaarstraat 1, B-2000 Antwerpen (Belgio).

NI GRATULAS

● Sam-ano Stefano Basilius Rejnič (*Ĉeĥoslovakio*) sacerdotiĝis en Romo 24.2.1980.

Ceestis lian Unuan Meson, 2.3.1980, kelkaj romaj Esperantistoj.

● Sam-ano H. Klene (*F.R. Germanio*), Dumviva Membro de IKUE, 19.5.80 celebros sian « diamantan edziĝon ».

● En la kadro de la ĉiujara filatela aranĝo « *Praphilex* », unu el la ĉefaj en Italio, Antonio De Salvo ekspoziciis (11-16.3.1980), en la historia Urbestra Palaco de Prato, parton el sia filatela kolekto titolita « *Unu lingvo por ĉiuj* ».

La partopreno de De Salvo en la ekspozicio estis tiel komentita en la luksa katalogo, senpage distribuita al la multnombraj vizitantoj (inter kiuj multegaj gejunuloj): « *Selektitaj pecoj el kolekto pri esperanto, la plej kompleta hodiaŭ videbla en Italio* ».

La ĉijara « *Praphilex* » estis aparte dediĉita al la rilatoj inter filatelo kaj gazetaro; kaj De Salvo estis invitita al Prato (je kostoj de la Komunumo, de la Turisma Entrepreno kaj de la Ŝparkaso, en unu el la plej luksaj hoteloj) kiel membro de la Itala Unuiĝo pri Filatela Gazetaro (USFI). Estas interese, ke, siatempe, De Salvo estis akceptita en tiun prestiĝan asocion dank' al la filatelaj artikoloj, en Esperanto aŭ pri Esperanto, kiujn li verkas por Radio Roma kaj por diversaj gazetoj.

Je la fino de venonta septembro, De Salvo kunlaboros en la aranĝo, en la itala urbo Lucca, de filatela ekspozicio komplete dediĉita al Esperanto. En tiu okazo, eble li ankaŭ aperigos ilustritan katalogon pri Esperanto-filatelo.

● Sac. Francisko Bommer (*Svislando*) instruas Esperanton po 2 horojn ĉiusemajne al 7 knaboj, kiuj, en la Kolegio « S. Marie » de Martigny, elektis la lingvon internacian kiel « kulturana okupon » inter 22 aliaj elekto-eblecoj oficiale proponitaj kaj lernigitaj.

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR MARTO

Generala: por ke la eŭkaristia ofero iĝu ĉiam pli, por la kristanoj, fonto de vivo kaj de striktega reciproka unuiĝo en la karitato.

Misia: por ke en Filipinoj daŭre floru la misiistaj vokiĝoj.

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR APRILO

Generala: por ke la Sinjoro donacu al sia Eklezio multnombrajn vokiĝojn, sacerdotajn kaj gereligiulajn, por ke ĝi plibone plenumu sian evangeli-zan mision.

Misia: por ke la kristanoj de Aŭstralio kaj Oceanio sentu la sindevigon disvastigi la regnon de Dio, kaj ĝin komuniku al la aliaj kun pli granda fervoro.

PRI LITURGIO

● Magnani kaj De Salvo longe parolis, 13.3.1980, kun Mons. Alessio, funkciulo de la Kongregacio pri Sakramentoj kaj Dia Kulto, rilate la nunan staton de la uzebleco de Esperanto en Liturgio.

Kvankam ne temis pri oficiala interparolo, oni povis reciproke klarigi kelkajn malgataĵojn, kaj oni informis unu la alian, respektive pri la uzado de Esperanto en Liturgio kaj pri la nuna sinteno de la Kongregacio koncerne la uzadon de etnaj lingvoj.

El la interparolo oni povis konkludi (kvankam, kiel dirite, *en neoficiala formo*), ke oni ankaŭ povas opinii, ke la ĝenerala rajtigo por uzado de Esperanto, siatempe donita de la Kongregacio, « eksperimente », sed sen datlimo, *daŭre validas*, ĉar neniam estis eldonita *dekreto* por senvalidigi tiun rajtigon. La *leteroj*, per kiuj la Kongregacio ekde 1977 neis la aplikeblon de tiu rajtigo, verŝajne ne povas senvalidigi la rajtigan dekreton, siatempe eldonitan, cetere, surbaze de papa decido (de Papo Paŭlo sesa).

Tamen, por ne inciti la Kongregacion, estas konsilinde, ke almenaŭ por la plej gravaj okazoj oni petu, anticipu, porokazan permeson. Samtempe, estas necese, ke oni atingu la subtenon de Kardinaloj kaj Episkopoj, kiuj emfazas *personne* ĉe la Kongregacio la *paŝtistan* valoron kaj signifon de la uzado de Esperanto en Liturgio, precipe en tiuj medioj (ekz. internaciaj kunvenoj) kie Esperanto estas la sola rimedo de komuna partopreno en la diservo.

Lige kun la supre skizita situacio, ni urĝe alvokas por ke:

1) oni avertu la Centran Oficejon pri tiuj Esperanto-aranĝoj de 1980, dum kiuj oni planas okazigi Esperantlingvan Meson (laŭeble kun detaloj pri la aranĝo);

2) oni klopodu kontakti Kardinalojn kaj Episkopojn, por ke ili *personne* pledu ĉe la Kongregacio pri Sakramentoj kaj Dia Kulto, emfazante la *paŝtistan* valoron de la uzado de Esperanto en Liturgio.

● Por la Esperant-lingva Liturgio estas uzataj multaj tekstoj, apud tiu oficiala (siatempe aprobita de la Kongregacio pri Sakramentoj kaj Dia Kulto). Kompreneble, oni devas forigi ĉi tiun mankon de unueco, ne nur ĉar la tekstoj neaprobitaj estas neuzendaj, sed ankaŭ ĉar tiu diverseco malfavore atestas pri la seriozeco de la Esperanto-afero.

Kompreneble, tio ne signifas, ke oni akceptu blinde kaj senrezerve la aprobitan tekston, sed nur, ke oni uzu tiun tekston ĝis oni povos aprobigi alian, kiu rezultu el la spertoj akumulitaj diverslande dum multjara uzado.

Malgraŭ kelkaj kritikoj (ofte eĉ viglaj), la aprobita teksto — grandparte prizorgita de P. Giacinto Jacobitti, kaj reviziita de la jugoslava Episkopo Mons. Alfredo Pichler — aspektas uzenda, eĉ se plibonigenda. Ĝuste por tiu plibonigo oni nun klopodas starigi komisionon (internan al la katolika Esperanto-movado, do neoficialan).

A.D.S.

LEGANTOJ SKRIBAS

● Mi ankoraŭ « ekzistas » en tiu ĉi malgaja mondo, kun miaj 77 jaroj, sed mi ne povas diri, ke tro bone. Estu la volo de la Disinjoro. Fratajn salutojn kaj bondezirojn.

Johano Hamvai, Novzelando

● Nia Esperanto-rondo « *Kunlaboro* » konsistas el 80 personoj, kaj 35 partoprenas Esperantokurson.

Ĉiujare ni organizas, en januaro, novjaran feston (v. foton). Ni ankaŭ partoprenas Esperantlingvan Meson en Vroclavo (ĉiumonate kelkaj personoj) kaj Spiritan Ekzercojn en Gostyń.

Dum niaj renkontiĝoj ni legas, parolas, tradukas, korespondas. Ni ankaŭ multe turismas.

*Rondo « Kunlaboro »
skr. poczt. 49
PL-63.900 Rawicz (Pollando)*



Festo de la E-Rondo « *Kunlaboro* » en Rawicz (Pollando)

● En EK 10-11/79 mi legis la rezolucion de la IKUE-Kongreso en Luksemburgo, kaj kun granda surprizo mi rimarkis, ke ne estas fiksita iu programo de faro, sed nur dankoj; ĉu estas eble?

Senfina estas la ag-ebleco de IKUE, en la katolika kampo, por la disvastiĝo de Esperanto. Ekzemple, estas tre grava kaj urĝa nia agado en la Seminarioj kaj katolikaj lernejoj (laŭ konsilo de F. Gruiĉ el Jugoslavio); kaj oni faru, ke Vatikana Radio elsendu en Esperanto ĉiutage, post la disaŭdigo de la Sankta Rozario, anstataŭ la novaĵojn en diversaj eŭropaj lingvoj, por kiuj oni dissendas jam abundajn programojn.

Ĉu vi povus informi pri la diritaj agoj per EK?

Leo Franzoni, Treviglio (Italio)

Mi ne rajtas prijuĝi la konsiston de la fina kongresa rezolucio, kvankam (se estas al mi permesate esprimi personan opinion) mi mem preferus pli konkretan enhavon. Tian enhavon, ĉiukaze, oni nun klopodas liveri per multflankaj iniciatoj, kiuj, tamen, tre ofte ne estas diskonigataj, ĉas ili disvolviĝas ankoraŭ en delikataj cirkonstancoj (precipe en la kampo de Seminarioj, de Vatikana Konsilio pri Internaciaj Laikaj Asocioj, de Liturgio).

Koncerne Vatikanan Radion, bedaŭrinde via propono, kara amiko, ŝajnas al mi nerealigebla en la nuna momento, pro absoluta manko de homaj fortoj por prizorgi eventualan ĉiutagan programon (ni preterlasu la demandon, ĉu VR pretas doni pli da spaco al Esperanto): pensu, ke pro la cirkonstancoj jam plurfoje menciitaj en EK, eĉ la nunaj elsendoj riskas malaperi. Fakte, P. Giacinto Jacobitti, nun pli ol 75-jara, kaj ne tute bonfarta, laŭgrade retiriĝas el sia posteno, kaj s-ino Elizabeta Puracchio, pro san-kialoj, antaŭ kelkaj semajnoj devis interrompi sian kunlaboron. Momente, oni solvis la problemon per la bonvola, tamen provizora, helpo de la juna usona seminariano Kevin Laughery kaj de s-ino Carolina Minnaja, kaj, samtempe, per la sekretaria laboro (*je totala kosto de P. Jacobitti mem!*) de sindonema esperantistino. Kiom longe, tamen, la afero povos daŭri? IKUE estas aktive serĉanta solvon, kaj oni jam faris plurajn demarŝojn, sed ankoraŭ oni ne havas trankviligajn certecojn. La ĉefa problemo estas, ke en Romo mem ne ekzistas homoj kiuj povu kaj deziru preni sur sin ĉi tiun *pezan* zorgon de Vatikana Radio, des pli ke ĝi estas senpaga, eĉ ĝi postulas elspezojn; la utiligo de neromaj esperantistoj estas malhelpata de la fakto, ke por tiuj oni devus ankaŭ trovi vivrimedojn en Romo, ekster la Esperanto-laboro (IKUE povos, laŭ mi, *iel* kontribui, sed certe *ne tute*, ĉar tio postulus tian elspezon, ke oni devus forigi «*Espero Katolika*»-n, aŭ oni formangus la tutan IKUE-kapitalon en la daŭro de nur kelkaj jaroj). Pro teknikaj kaŭzoj, krome, aspektas nerealigebla la propono, benvole farita de la pola animzorganto, ke oni preparu la elsendojn en Pollando kaj oni sendu al Romo la registraĵojn.

Ĉar la temo estas unuarange grava, kaj ĉar multaj iniciatoj estas ankoraŭ survoje, oni amplekse sciigos, pri la stato de la afero, en venontaj numeroj de EK.

Antonio De Salvo

● Bonvolu, en la sekvonta jarlibro, ne skribi antaŭ mia nomo « F-ino ». Mi konas la Esperantan kutimon: kiu ne estas edzino, tiu estas oficiale nomata fraŭlino, dum kiu ne estas edzo, tiu ne estas oficiale nomata fraŭlo. Eĉ mi scias, ke foje forblovos tiun malkonsekvencon la vento de la tempoj, kun aliaj antikvaĵoj. Sed nun mi petas la ŝanĝon pro praktika kaŭzo. Mi ricevas leterojn de eksterlandaj junuloj, kiuj opinias min juna knabino, kaj deziras korespondi. Bonvolu senŝarĝi min de tiu malagrabra situacio.

Anna Németh

gimnazia profesorino, pensiulino
Budapest, Hungario

Ĉar nova jarlibro ne estas planata, almenaŭ por la momento, mi tuj diskonigas la peton de prof-ino Németh, per la paĝoj de la revuo.

Antonio De Salvo

● Mi estas « hejme » en Usono de novembro, en hejmo por aĝuloj. Mi alkutimiĝis al la nova vivmaniero. Nura malfacilaĵo estas la distanco de la urbo, ĉar mi, havante unu okulon nevidpova kaj la alian malforta, devas dependi de aliaj personoj. Mia fratino Elvira estas sindona volontulino.

La 14-an de junio forpasos 50 jaroj de mia sacerdotiĝo (mian Unuan Meson mi celebris en Romo, en S. Maria la Plej Granda). Tamen, mi « festos » la datrevenon la 1-an de venonta junio, dimanĉon honore al la Sankta Triunuo, samkiel 14.6.1930. Mi ne sendos invitojn, sed mi neformaligos la aranĝojn, kiel taŭgas pro la graveco de la tempoj kaj pro mia kondiĉo: Meso ĉi tie je la 15-an horo, kaj sekve bufeda tagmanĝo. Estu certigataj pri varma bonvenigo!

Fatimo kaj Portugalio? Fatimo ŝanĝiĝas, sub la influo de nekredbla ĵkreskado. La poredukaj establoj, komerco kaj industrio, turismo ktp, donis sekularigan efekton. La pli maljuna generacio mortas, kaj tial Fatimo perdas iom da sia intimeco kun la aperoj. Miaj 19 jaroj tie vidis eble la periodon de plej vasta ŝanĝo ĉe Fatimo...

Patro Gabriel Pausback, O. Carm.
8419 Bailey Road
Darien, Illinois 60559, Usono
(antaŭe en Portugalio)

Gratulojn pro la 50-jara jubileo, kaj bondezirojn!

Dum la 65-a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo, Svedio (2-8.8.1980), Ekumena Diservo havos lokon (kunlabore inter IKUE kaj KELI) en la granda Katedralo.

Katolikaj Sacerdotoj, kiuj intencas partopreni la Kongreson, kaj kiuj pretas kunlabori en la aranĝo de la Diservo, estas petataj urĝe kontakti la Centran Oficejon de IKUE en Romo.

ESPERANTO EN TAJVANO

Mi volas sciigi kelkajn novaĵojn koncerne la Esperanto-movadon en Tajvano:

1) mi tradukis en la ĉinan la artikolon « Papo Johano Paŭlo dua kaj Esperanto », aperintan en EK 12/1978. Du katolikaj semajnaj gazetoj (« *Kristana Vivo* » kaj *Bona Konsilo* ») ĝin publikigis, eĉ en la unuaj paĝoj, en majo 1979;

2) en oktobro 1979, mi rekomencis Esperanto-kurson por la gestudentoj de la « Fu-jen Katolika Universitato ». 137 gestudentoj aliĝis al la fundamenta kuso, kaj 6 al tiu por progresintoj;

3) la 15-an de decembro 1979, okazis en la « Fu-jen Universitato » konferenco pri la eksterklasaj agadoj de la gestudentoj. Estis aranĝita, tiu-oka-ze, ekspozicio por montri la diversajn agadojn; ankaŭ la Esperanto-Societo de la « Fu-jen Universitato » partoprenis en la ekspozicio, elmontrante tri-dekon da libroj en Esperanto, ekzemplerojn de diversaj Esperanto-periodaĵoj, portretojn de Zamenhof kaj de Papo Pio deka, kaj verdan flageton. Multaj profesoroj kaj studentoj vizitis la ekspozicion kaj montris interesigon;

4) nova ĉina-Esperanta vortaro baldaŭ aperos. Pastro Marko Ŭang, membro le IKUE, verkis ĝin. Ĉi tiu vortaro enhavas ĉirkaŭ 24.000 ĉinajn terminojn en ĉina skribo kaj kun esperanta elparolo, kaj la tradukojn en Esperanto. Ĝi estas nun presata;

5) estis eldonita kolekto de miaj artikoloj, verkitaj en la ĉina, en la angla kaj en Esperanto, aperintaj dise tra la Esperanto-gazetaro en la lastaj 50jaroj. La eldono estis prizorgita omaĝe al la ora jubileo de mia sacerdoto-ĝiĝo, kiu okazis 18.1.1930. La kolekto konsistas el 90 artikoloj.

*P. Johano B. Se-ĉien Kao
Tajvano/Ĉinio*

Mi estas certa interpreti la penson de ĉiuj IKUE-anoj, kiam mi sincere gratulas P. Kao, pro liaj 50 jaroj da sacerdoteco kaj pro lia senlaca Esperanto-agado.

Antonio De Salvo

BONAN PASKON!

● Dum la Kongreso de Esperanto en Sorocaba (Brazilo), de la 23-a ĝis la 27-a de januaro 1980, oni aranĝis Esperantlingvan Diservon, kun kantoj, muzikoj, preĝoj. Partopreno estis ĝenerala.

● Ĉiun unuan vendredon de la monato, je la 18-a horo, Meso en Esperanto estas celebrata de P. Carlo Trincherio, en kapelo de la « Domo por katolikaj asocioj » de Vercelli, Italio.

KATOLIKA HORIZONTO

● La Kongregacio de la Dia Vorto (*Verbitoj*) konsistas el 5.261 religiuloj apartenantaj al 54 landoj. Fondite en 1875 kiel misia instanco por sacerdotoj laŭ germana kaj nederlanda lingvoj, la Kongregacio baldaŭ transpasis la limojn de la devenlandoj, kaj iĝis internacia. Per 1.350 membroj, germanoj daŭre konsistigas la plej multnombran grupon, sed post kelkaj jaroj ili verŝajne ne plu havos ĉi tiun rekordon, dank' al la forta kaj bonvena pliiĝo de vokiĝoj en Orienta Azio, precipe en Filipinoj.

Laŭnombre, la dua grupo estas, hodiaŭ, tiu nordamerika (518); sekvas poloj (502), filipinoj (430), indonezianoj (369), nederlandanoj (368), hindoj (340), aŭstroj (190), argentinanoj (174), irlandanoj (125), ĉeĥoslovakoj (114), brazilanoj (100), hispanoj (86), svisoj (78), japanoj (64), hungaroj (55), ktp.

Estas aparte substrekinde, ke ne mankas verbitoj, apartenantoj al landoj tradicie konsiderataj misi-ricevantaj, kiuj iĝis misiistoj en landoj kun pli grandaj misiaj bezonoj: tio okazas, ekzemple, koncerne Filipinojn, Argentinon, Brazilon, Hindion, Paragvajon kaj Japanion.

● En sia 11-jara ekzisto, la Seminario por malfruaj vokiĝoj de Colle Val d'Elsa apud Sieno (Italio) havis 120 studentojn, el kiuj 13 iĝis sacerdotoj, 7 diakonoj, kaj 43 ankoraŭ sekvas teologiajn studojn. Ekde la fondoĵaro, la nombro de la studentoj daŭre kreskis, kvankam neregule. La aĝo varias de 18 ĝis 45 jaroj, samkiel varias la deveno, el ĉiuj italaj regionoj.

Pri la studentoj de la Seminario, la Episkopo de Sieno, mons. Castellano, deklaris:

«La kulturo de ĉi tiuj plenkreskuloj, preskaŭ senescepte, estas tiu teknika-sciencia jam generaliginta en Italio. Pri tio, ili spertas grandajn malfacilaĵojn por eklerni la humanismajn konceptojn kaj por alĉutimiĝi al la filozofia rezonado, kaj nur parte ili sukcesas superi ĉi tiujn fundamentajn mankojn. Ili estos sacerdotoj kun pensmaniero alia ol tiu tradicia, sed eble pli proksima al tiu de nia nuntempo».

● «*La vojo*», la plej konata el la verkoj de mons. Escrivà de Balaguer, fondinto de la institucio «*Opus Dei*», jam atingis 2.800.000 kopiojn. Antaŭ nelonge aperis la 15-a eldono en itala lingvo, kiu aldoniĝis al la 154 eldonoj en 34 lingvoj (inkluzive de Esperanto). Estas planataj eldonoj en lingvoj albana, bulgara, korea, norvega, sveda, ŝahila kaj vjetnama.

Ankaŭ la aliaj spiritaĵoj de mons. Escrivà de Balaguer daŭre havas ampleksan disvastiĝon: «*Sankta Rozario*» estis eldonita, ĝis nun, 48 fojojn en 11 lingvoj; la «*Interparoloj kuu mons. Escrivà de Balaguer*» atingis 29 eldonojn en 6 lingvoj; «*Amikoj de Dio*», aperinta antaŭ nur du jaroj, jam estas furora. La homilioj de la fondinto de «*Opus Dei*» estis presitaj en 2.100.000 ekzempleroj, laŭ entute 594 eldonoj en pluraj lingvoj.

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkoton al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La jara kotizo de membro-abonanto estas 20 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝigo de la kurzoj de valutoj, precipe de svisa franko, la sube indikitaj egalvaloroj havas nur informan celon.

Argentino

P. Bruno Ostropolski
Av. Libertad, 75
AR - 3360 Obera, Misiones

Aŭstralio

V. J. Timmins
73 Alexandria Parade
Hornsby N.S.W. 2077

Aŭstrio

W. Mudrak
Beatrixgasse, 19/9
A - 1030 Wien III - p.k. 105.713
sil. 160

Belgio

E. Paesmans
Lange Koepoortstr. 64
B - 2000 Antwerpen
p.k. 000-0414589-11; b. fr. 350

Brazilo

P. Pietro Urbaitis
caixa postal 4421
BR - 01000 S. Paulo, S. P.

Britio

J. Harris
26, Dare Road
Birmingham B23 6PD
br. p. 6

Ĉeĥoslovakio

Aleš Berka
Na Vyhliedec 1002, p.s. 28
CS - 755.01 Vsetín

Francio

P. R. Degrelle
11, cours Léopold
F - 54042 Nancy Cedex
p.k. 2555 38 L, Nancy
fr. fr. 52

F. R. Germanio

J. Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D - 545 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726 - 673, Ludwigshafen
Rhein; gm 24

Hindio

P. O. M. Lucas, ofm Cap.
Shanti Ashram, Gandhipuram
Coimbatore 641012

Hispanio

Miguel Martinez
Av. da San José 105, pral 3a
Zaragoza - pes. 850

Hungario

P. Lajos Köbor
Fö u. 58
H-9365 Dénesfa

Irlando

P. J. O'Reilly
« Monksilver », Howth Summit
Co. Dublin

Islando

Torfi Ólafsson
Melhaga, 4 - 121 Reykjavík

Italio

P. Duilio Magnani
Viale C. Zavaglini, 73
I - 47037 Rimini (Forlì)
p.k. 28/19956 (UECI) -
lir. 10.000

Japanio

Hatirô Matubara
Namimatu-tyô 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu

Jugoslavio

P. Prof. Franjo Gruič
Strossmayerov trg, 5
YU-54400 Djakovo
din. 200

Kanado

P. Proulx
790, 80-ème rue Est
Charlesbourg 7 Québec
G1H 1A9

Kolombio

Jorge Velásquez G.
Apartado aéreo 51740
Medellín

Suda Koreo

P. Kiseng Kim
I.P.O. Box 2752 - Seoul

Luksemburgio

H.J. Kindler
1 A, rue des Bains - p.f. 628
p.k. 5088-44
Luxembourg

Madagaskaro

Roger Roudrianccka
BP 14
Amba Andriaka

Meksikio

P. J. M. Claramunt
Apartado postal 318
Oaxaca, Oax

Nederlando

S. P. Smits
Dunantstraat, 164
NL 2713 VC Zoetermeer
p.k. 685124 - gld 25

Norvegio

S. Murak
Semsvn 166, N - 1370 Asker

Nov-Zelando

J. Hamvai
29 Arran St.
Avondale, Auckland 7

Pollando

P. J. Gotter
Trzebnice 113
PL-59.312 Chocianowice

Svislando

P. Scherer - Graber
Erlen-Str. 58
CH - 6020 Emmenbrücke/Lu
sv. fr. 20

Tajlando

P. M. Perray
GPO Box 1846 - Bangkok

Tajvano/Formozo (Ĉinio)

P. J. B. Se Cien Kao
P.O. Box 1269
Taipei 100, Taiwan R.O.C.

Urugvajo

R. Zeballos Morales
Av. Centenario 3099, C., Ap. 805
Montevideo

Usono

Mark B. Weddell
109 Gulf Boulevard
Indian Rocks Beach
Florida 35535
us. dol. 13

Centra Oficejo

IKUE, via Berni 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000

